NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
☎: 944.16.44.92
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

E-kursoj: Lunde kaj Merkrede
Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato

Majo/Junio 1.998.

FIESTA DE FIN DE KURSO.

El próximo **sábado 20 de Junio**, a las **7,30 horas**, vamos a celebrar en el Grupo la ya tradicional fiesta de fin de curso durante la que se impondrá, a l@s alumn@s del actual curso elemental, la "verda stelo", como símbolo de su incorporación al mundo Esperantista.

Los actos comenzarán con el visionado de un vídeo, a lo que seguirá un debate y, como también es tradición, continuaremos hablando, durante un rato, alrededor de una mesa, mientras disfrutamos de un sencillo ágape.

Como de costumbre, para esta pequeña comida, se ruega que cada soci@ aporte algún alimento; pan y bebidas corren por cuenta del Grupo.

Y si la llamada a asistir a esta fiesta es para tod@s l@s soci@s, familiares y simpatizantes, de manera muy especial nos dirigimos a aquell@s que han sido alumn@s nuestr@s durante el presente curso. Os esperamos a tod@s.

MALLONGE.

* ***Libroj***: Inter 1994 kaj 1996, Ĉina E-eldonejo eldonis 11 librojn, enhavantaj entute 3.142 paĝojn.
* ***Bretona***: Tiun-ĉi keltan lingvon vi povas lerni per "La bretona lingvo ... rapide kaj facile (Brezhoneg buan hag aes)" de Per Denez, trad. de M. Runpaot.
* ***Astronomio***: Ĵus aperis sciencpopulariga libro de David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel. Informoj ĉe: http://www.mz-verlag.de
* ***El Popola Ĉinio***: Ekde la marta numero, estas ankaŭ legebla en Interreto ĉe: http://www.china.org.cn

(Daŭrigas sur la 2-a paĝo)

BILLY, KOMPUTILA LUDO EN ESPERANTO.

Temas pri klasik-stila plat-forma ludo en tre alta kvalito, grafike kaj sone en Esperanto. Imagu ke vi troviĝas en revlando, ĉirkaŭita de strangaj monstroj, kiuj baras la vojon tra mistera lando, kie nur la fantazio limigas vin.

La ludo havas, inter aliaj:

- Klarigoj tute en Esperanto kaj 6 aliaj lingvoj
- Pli ol 100 niveloj en 5 malsamaj mondoj.
- Grafikan malkomponon de 800x600 punktoj.
- Sonefektojn de alta kvalito (16 bitaj).
- 14 KD-kvalitajn melodiojn.
- Neperfortan , infanamikan ludideon por 5-jaruloj kaj pliaĝuloj.
- 3-dimensiajn lud-figurojn ĉie en la ludo, k.t.p.



Vizitu la ret-paĝon de la ludo kaj akiru senpagan, plene ludeblan demo-version: **http://www.esperanto.dk/billy/**

DUA RADIO-ELSENDO PER INTERRETO.

Post la E-programo de pola radio, aperis, nun, ankaŭ la E-redakcio de estona radio per interretaj elsendoj. Oni povas ĝin trovi ĉe **http://www.er.ee/tallin/**

Per la subprogramo Real-Aŭdio, la E-elsendoj estas aŭskulteblaj iam ajn, do oni ne plu estas ligitaj al la elsendo-horoj nek al la kondiĉoj de propagiĝo de radio-ondoj.

11.111 HOMOJ SUBSKRIBIS LA MANIFESTON DE PRAGO.

La nombro de ***subskriboj por la Manifesto de Prago*** atingis "rondan" cifero n la 15-an de Majo, ĉar en tiu tago la Centra Oficejo de UEA registris la ***11.111***-an apoganton. Por helpi al tiuj, kiuj deziras pli profunde studi la enhavon de la Manifesto, UEA preparas stud-kajeron kun artikoloj pri ĉiuj sep tezoj de la Manifesto. La kajero estos uzebla por memstudado sed ĝi aparte taŭgos kiel enkonduko por diskutoj, ekz. en kluboj kaj Esperanto-aranĝoj. Ĝi estos lanĉita en la UK de Montpeliero. (Raportis: Miguel Gutiérrez Adúriz).

MALLONGE. (Venas el la 1-a paĝo).

* ***CNN***: Tiu-ĉi tutmonde spektebla usona novaĵkanalo 2-minute elsendis pri Esperanto en Decembro 1997. Unu monaton poste, la 30-an de Januaro, la eŭropa-azia programo dediĉis duonhoron al la eŭropa lingvo-problemo, ambaŭfoje pozitive pritraktante E-on.

* ***UK***: Ĝis la 20-a de Aprilo, al la Montpeliera Universala Kongreso de Esperanto aliĝis 2.502 personoj el 62 landoj.

KORESPONDI DEZIRAS.

Mi estas 20-jara polino. Interesiĝas pri muziko, sporto, aŭtomobiloj. Mi estas komencantino kaj volus korespondi kun vi. Mi petas vin pri via foto. Mi esperas ke vi respondos al mi.
Ula Sokotoloska. ul. Braniewska, 19. 14-520 PIENIEZNO. woj. elblaskie. POLIO.

Mia nomo estas Cody kaj mi havas 10 jarojn. Ĉu vi deziras skribi al mi?. Mi sendas al vi desegno de mia preferata ludo. (*Sekve aperas krajona desegno kun sceno de usona futbalo kaj la nomo de la teamo: "Denver Broncos"*).
Cody Byars. Rt. 11 79239. LAKEVIEW Tx. USA. P.O. Box 114.

Mi instruas Esperanton al pli ol 50 studentoj. Ĉu ili en estonto uzos nian Internacian Lingvon, dependas de mi kaj ne nur. Se ili trovos amikojn kaj korespondos, ili uzos la lingvon kaj ne forgesos. Se estas ebla, bonvolu publikigi la sekvan tekston:
"Gestudentoj, fraŭloj kaj fraŭlinoj, edziĝintaj viroj kaj virinoj, 22-62 jaraj, volas korespondi. En estonto ili estos juristoj, komercistoj kaj ili jam scias kelkajn naciajn lingvojn. Skribu al instruistino: Alida Zigmunde. "Daŭgavieŝi". Poŝto Katlakalns. Rigas raj. LV-2111. LATVIO.

NOTO: **La originalaj leteroj troviĝas ĉe ni.**

SERĈAS KUNVOJAĜANTOJN.

Mi estas **junulo el Madrido**, HEF-ano, nun lernanta E-on. Mi intencas partopreni venontan IJK-on (Internacia Junulara Kongreso) en **Kroatio** (25-07 ĝis 01-08). Tre plaĉus al mi kunvojaĝi kun aliaj partoprenontoj de tiu kongreso.
David Trigo Pérez. Av. Pablo Neruda, 55-portal 6-1ºB. 28018-MADRID. Tel. 91.778.18.01.

Bilbao-ano ne-esperantisto planas vojaĝi, je la komenco de Aŭgusto, al **Nederlando kaj Germanio**. Li serĉas aŭtomobilajn kunvojaĝantojn por malpliigi la vojaĝ-kostojn
José Carlos Monasterio. Apartado 304. 48080-BILBAO.

Per biciklo al Santigo de Compostela. Por esperantistoj kaj simpatiantoj. Ni startos la duan semajnon de Aŭgusto el Burgos. Ĉirkaŭ 600 km; 7-10 tagoj; tiuj interesitaj povas demandi en la Esperanto-Grupo de Bilbao.

Internacia Junulara Semajno



19-25.07.98
Hungario
Unu el la plej...

LASTAJ NOVAĴOJ.

Senkosta KEF-98. Ĉi-jare, la Kultura Esperanto-Festivalo revenos al Svedio. Por ĉiuj ŝatantoj de teatro, muziko aŭ literaturo estas jen la ŝanco fari iom mem, kune kun aliaj. Pro oficiala subteno de la Konsilio de Eŭropo, la programo estos senpaga. Ĉiuj partoprenantoj, kiuj aliĝos antaŭ la 10-a de julio partoprenos senpage. Nura kosto estos tiuj de loĝigado kaj manĝigado. Pli da informoj ĉe **http://www.esperanto.se/kef/**. Bonvenon al Lesjöfors, Svedio. (Raportis Miguel G. Adúriz).

Mi ĵus metis en la reton la ***lastan numeron de "Kajeroj el la Sudo"***, kiun vi povas legi ĉe: **http://www.distrito.com/esperanto/k38.htm**. Mi atendas viajn komentojn. (Informis: Jesuo de las Heras. Mursjo).

La pasintan 15-an de Majo, en la nacidissenda radiostacio ***"Radio 5, todo noticias"***, viro parolis pri la nova eŭropa komuna monunuo, eŭro, kaj okaze de tio, li diris ke nur restas lingvaj bariloj, falontaj kaj falendaj. Sekvis, dirante ke tiu falo ebligus pli fluan ekonomian movadon, ktp. La solvo ne estas, laŭ li, ke la ŝtatoj eŭropaj adoptu ian nacian lingvon (nome, la anglan) kiel intereŭropan, pontan lingvon, pro la ĝeno, kiun tio kaŭzus al aliaj nacioj (li menciis eĉ "casus belli"). Do, sekvis la parolanto, "estos necesa alia solvo, pri kiu indus paroli aliokaze. Fine de la raporteto, la viro prezentis sin kiel prezidanto de ia ekonomia asocio de entreprenistoj. Bedaŭrinde, mi memoras la nomon nek de la viro nek de la asocio. (Raportis Manuel Pancorbo).

La estraro de UEA elektis kongresurbojn por la jaroj 2000 kaj 2001: Tel-Avivo kandidatis jam por la 3-a sinsekva fojo; ankaŭ Zagrebo kandidatis por la jaro 2000. La Ĝenerala Direktoro, Osmo Buller, proponis elekti tiun duan, ĉar situacio en Mez-Oriento estas tro malstabila kaj nesekura, pro kio estus tro riske, i.a., pro financaj konsideroj (la UK en Adelajdo ja estis deficita, ĉ. 24.000 gld.); tamen, plimulto de la estraranoj ne trovis tiun riskon tro granda kaj sekve, Tel-Avivo ricevis la honoron gastigi la UK-on de la jaro 2000.

Zagrebo pretis okazigi UK-on ankaŭ en 2001; la estraro tuj utiligis tiun pretecon kaj sekve elektis Zagrebon por tiu jaro. (Raportis Adúriz)
Noto: Ni rememorigas ke la kongresurbo de la jaro 1999 estos Berlino (31 Jul/7Aŭg.)

Kvankam la ekonomio de la "gepatra" UEA fartas pli kontentige ol antaŭe, tiu de ***la junulara sekcio, TEJO, kauzas zorgojn***. La IJK-oj de 1996 kaj 1997 kreis sume pli grandan deficiton ol la UK de Adelajdo. Tia evoluo estas tre danĝera. La UEA-estraranoj do tre maltrakvilis, ke iliaj TEJO-kolegoj ne donas sufiĉan atenton al tiu problemo. (Raportis: Adúriz).

Grupo NIFO, eldonanto de la sciencfikciaj libroserioj "Sferoj", "Orbito Nula" kaj "Future" havas de nun elektronikan poŝton: **gruponifo@esperanto.nu**
(M.G.A.)